5-a Jaro
N-ro 1 (22).

Majo 1930.
*Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro: WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO:

**P. Erich Przywara, S. J.,** La spirita situacio de nia tempo kaj nia religia misio. — **Marc Schérer,** La labora vivo. — **Willy Flammer,** Praktika preslaboro de svisaj studentoj en la Katolika Agado. — **Ĥina MOKA-komitato.** — **W. S.,** Pri la eksterlanda kaj paca agado de la anglaj katolikoj. — **El la lando de la Internacia Eŭkaristia Kongreso — Venu al Budapest! — Wilhelm Solzbacher,** Taskoj kaj eblecoj de internacia kunlaborado de la katolika junularo. — **Pastro D-ro Carl Sonnenschein,** Liberan straton, ankaŭ por ni! — **Spegulo de la tempo** (« Sendiaj infanoj en Rusujo — Vivu la milito? — La flava danĝero — Persekuto de la religio en Rusujo.) — **Gravaj internaciaj kongresoj kaj kunvenoj 1930. — Jubilea Kolekto por J. B.**

REDAKCIO: **Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.**

Eldonejo: ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germ. (Regina Reiff).

# Abonprezoj de " La Juna Batalanto „

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj. kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 14 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4 zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4,50 p | 2 p | Usono | 0,50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos nian jarlibron kaj aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj :* Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA, kies adresojn vi trovas en alia loko de la gazeto.

*Poŝtkontoj.* Germanujo : Köln 48037 (Wilh. Solzbacher, Köln) ; Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo: Wien D 30461 (Ernst Gœrlich, Wien 3).

**POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN** en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvajn. Ili devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝo, por disdoni aŭ disvendi ilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. La propaganda eldono B (eldono A aperas en formo de revuo) kostas nur **po 3 fenigojn;** sed oni forsendas nur minimume 25 ekzemplerojn. Mendu !

« **JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » **estas** destinata por niaj **franclingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** por 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj !

**En angla kaj hispana lingvoj** similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.



# La spirita situacio de nia tempo kaj nia religia misio.

De P. Erich Przywara S. J.,

Resumo de lia parolado en la jara kunveno de la Katolika Junularo de Germanujo en Altenberg.

La situacio de nia tempo estas influata de la movadojaroj inter 1922 kaj 1926. Tri vortoj karakterizas tiun tempon : objektivismo, komuneco, religio.

La **objektivismo** signifas, ke nia pensado, en kontrasto al la opinio de Kant, estas denove pensado al objektoj ; tiel Husserl kaj Max Scheler kiel filozofoj, tiel Stefan George kiel poeto. En la katolikaro la objektivismo montriĝas en la liturgia movado. Tie oni ne pli rigardas al la malgranda « mi », sed al la granda objektivo, al Dio. Oni turnas sin al la objektiveco de la dogmoj, en la preĝado oni rigardas for de si mem al la altaro. Tiusence ĝi estis kaj estas turniĝo al la katolikeco. Sed aliparte la impulso, por rigardi en la vastecon de la senfino, fariĝas antaŭenpuŝanta movado pro la movado mem. Ĝi fariĝas dinamismo.

La dua karakteriza signo de la movadojaroj estas **komuneco.** Komuneco estas la vorto de la sociologioj de Max Scheler kaj Othmar Spann. Ĝi estas la celo de la junulara movado. Ĝi estas la senco de la liturgia movado : la « Ecclesia orans », la preĝado de la komunumo de la mistika korpo de Kristo. Tiusence ĝi estas turniĝo al la katolikeco. Sed aliparte oni diras en tiuj movadoj : komuneco ne estas organizo, komuneco radikas en la unufojeco de la sincereco inter « mi » kaj « vi ». La komuneco fariĝas fluanta vivo. Movado estas kiel movado pro la movado. Ĝi fariĝas **dinamismo.**

La tria vorto de la movadojaroj estas **religio.** La objektiva pensado fariĝas submetiĝo al la realecoj. Submetiĝo al la realo fariĝas submetiĝo al Dio : obeo de la kreitaĵo al Dio. Tiel por Karl Barth religio estas tio, kio « ne estas utila por io », ĝi estas celo en si mem. Oni ne demandas, kion oni profitas de Dio. Kion oni faras, tion oni faras pro la honoro de Dio. Ankaŭ ĉi tie fariĝas turniĝo al la katolikeco. « Mundus creatus est ad gloriam Dei », « la mondo estas kreita por la gloro de Dio». Tio estas la patoso, kiu konstruas katedralojn, tute egale, ĉu ili estas « utilaj » al io. Sed aliparte tiu direkto parolas strangan « ne » kontraŭ la videbleco de Dio en Lia Eklezio. La patoso de la honoro de Dio fariĝas militatako kontraŭ Lia Regno sur la Tero. La nevidebleco de Dio fariĝas gvidanta ideo de religia-radikala dinamismo. La dinamismo jam supre nomita ricevas sian plej altan formon : ĝi fariĝas absoluta en « dinamismo kiel religio ».

Tiu absoluta dinamismo estas dusenca. Ĝi estas **teknika** dinamismo kaj **nihilista** dinamismo. La unuan simboligas Ameriko, la duan Rusujo. La hodiaŭa **tensio** estas **inter Moskva kaj New-York.** La teknika dinamismo estas karakterizata per la hegemonio de la maŝino. La maŝino

estas spirita principo : en la simbolformo de la usona City. Ĝi estas io titane granda. Sed, kion ni samtempe sentas en tio, estas dissolvo. Ni ne sentas, kiel ni estas **apud** la maŝino, sed kiel ni estas **en** ĝi kaj jam parte **sub** ĝi. Ĉi tie montriĝas la interligiteco kun la nihilista dinamismo : kun la radikalismo de la rusa sindono-patoso. Ĝi neniel interesiĝas pri la gardado de la individua homo, ĝi postulas senindulgan sindonon. Ĝi estas plenumo de Karl Barth : aktiva radikalismo. La homo estas destinita al tio, ke li estu starigata en la ventegon, kiu lin dispeciĝas. Homo staras inter Dio kaj diablo. Teknika kaj nihilista dinamismo trapenetras unu la alian. Tio montriĝas en la hodiaŭa arkitekturo : la senindulge pura objektiveco de la konstruaĵo, sed en ĝia nuda vasteco la demoneco de la rusa ebenaĵo. Tio montriĝas en la hodiaŭa muziko : pura diatoniko, kiu tiom malmulte emas konsideri flatantan belsonecon, ke ĝi estas atonala, — sed en la malvarma intertranĉiĝo de tiuj atonalecoj la tranĉanta potenco de la mondjuĝejo. Tio montriĝas en la hodiaŭa filmo : la senekzempla teknika perfekteco de la rusaj filmoj, sed en la profundo de ilia historio la flamanta demoneco. Tio montriĝas plej akre en la tragiko de la hodiaŭa virino : disŝirita inter la amerikana girl-tipo kaj la tipo de la demonaj dancoj de Mary Wigman.

Kio fariĝos? Tio estas alia demando, kiun mi nun ne volas respondi. Sed certe estas, ke en ĉi tiu esĥatologia situacio ni povas kanti Tedeumon. Ĉar ĝi postulas tion, kio estas skribita laŭvorte en la Evangelio kaj en la Leteroj de Sankta Paŭlo : **senindulgan kristanecon.** Bapto estas starigiteco en esĥatologian situacion : « Mortui estis in Christo », « vi estas mortintaj en Kristo »! Sed ne mortinteco kiel ripozado, sed kiel aktiva mortado en Kriston. Enstarigiteco en **Lian Savotaskon** en la Eklezio.

Malĝusta reago al la situacio estus la malespero, kiu vivas en la multaj hodiaŭaj psikozoj kaj neŭrozoj. Ĉar esenca en la « mortado » ne estas la negativo, sed la pozitivo, kiu troviĝas en la **misio de la kristano.** Ĉi tie montriĝas kristana objektiveco. « Mi ne estas el la mondo, sed mi estas sendita en la mondon ». La patoso de la mortinteco fariĝas kristana agoforto. Esti martiro, signifas, **atesti. Ĉesas multagema, kompromisa kaj adaptiĝa katolikismo. Estiĝas katolikismo de la mortoforto.**

La senco de la amerikano estas la City, la senco de la ruso estas la Mesio-senditeco de Rusujo, en la spirito de Dostojevskij. La senco de la kristano estas **la plenumo de la volo de la nevidebla Dio** en la situacio de Golgotha. Temas pri tio : « Christo confixus cruci ». Kun Kristo mi estas alkrucigita. —

## « SENDIAJ » INFANOJ EN RUSUJO.

En Odessa okazis la unua kongreso de la infanoj organizitaj per la « sendiuloj », kun la celo, plifortigi la kontraŭreligian propagandon inter la infanoj. Estas transportitaj al tiu kongreso pli ol 500 infanoj 10-14 jaraj el plej diversaj lokoj de Ukrajnujo, kaj antaŭ ili la lokaj agitantoj faris kontraŭreligiajn paroladojn, insultante la religion kaj kalumniante la pastraron. La kongreso — informas Ofinor — elektis konstantan infankomitaton kun sidejo en Odessa kaj decidis, anigi al sia asocio en ĉi tiu jaro almenaŭ 50 procentojn de la ukrajnaj infanoj. La kongresraporto estos publikigata en kvin lingvoj kaj sendata al ĉiuj lernejoj de la lando.

Laŭ « Osservatore Romano », Vatikano.



# La Labora Vivo.

De **Marc Schérer,** membro de la ĝenerala komitato de la Franca Katolika Junulara Asocio (A. C. J. F.)

La brile sukcesinta kongreso de la Franca Katolika Junulara Asocio, okazinta 24-28 aprilo en Nancy, pritraktis la aktualan problemon de la « labora vivo », esplorante ĝin laŭ la diversa situacio por la laborista junularo, la junaj kamparanoj kaj la studantoj. Ni represas el la kongresa jurnalo artikolon de Marc Schérer, kiu ŝajnas al ni grava kaj interesa por la katolika junularo tutmonda.

RED.

Multegaj homoj dediĉis sian vivon al la realigo de la **kristana socia ordo**; **aliaj,** kontraŭe, parolas pri la **klasbatalo.** Tiel jam en la vortoj vidiĝas la socia konfuzo, en kiu ni vivas. La ordon, pri kiu kelkaj tiel fervore laŭdkantas, kie do, mi petas, oni rimarkas ĝin en nia socio donita al la ofte mortiga interpuŝadode antagonistaj « klasoj », kie sin puŝas ne nur kontraŭaj ekonomiaj interesoj, sed ankaŭ vivkonceptoj neinterpacigeblaj: Tia situacio metas urĝegan problemon antaŭ la kristanojn...

Sekve de la kreskanta specialigo de la tekniko (kiu evidentiĝas de la industria raciigo ĝis la limigo de la scienculo al ciklo de difinitaj fakaj studoj) nia socio sin trovas dividita en certan nombron da **sociaj klasoj,** kies ĉiu havas sian propran vivon kaj specialan mentalecon. Aŭ, se oni volas, kreiĝis certa nombro da **labor- kaj vivmedioj**, en kiuj la individuo devas vivi, ne trovante ekzistokondiĉojn memelektitajn.

La « klaso » do estas fakto en nia socio, kaj sendube oni povas diri, ke tiumezure, ke la malsameco de la socialaj funkcioj kaŭzas la malsamecon de la vivmanieroj, tiu malsameco de la klasoj estas sendanĝera necesceco; sed la klasdivido fariĝas fiuzo kaj ekseceso, kiam la malsameco de la vivmedio kaŭzas reciprokan malkomprenon kaj kaŝitan aŭ evidentan malamikecon.

Estas do devo de la kristanoj, serioze okupiĝi pri tiu neevitebla problemo de la klasoj. La tasko de nia kongreso en Nancy estas, esplori per skrupulemaj kaj kuraĝaj analizoj, kiel el tiu necesa malsameco devos estiĝi la harmonio nepre postulata per la kristana doktrino.

Precipe mi deziras atentigi pri ideo, en kiu oni tuj ekkonos la direktantan ideon de la kongreslaboroj. **Tio, kio kreis la socian konfuzon kaj malordon, en kiu ni vivas, estas malpli ekonomia krizo kaŭzita per difekta organizo de la ekzistobonoj, ol difekto en nia civilizo mem. La ideo ne estas nova; jam antaŭ longa tempo la « Syllabus » de Papo Pio IX-a kondamnis tiun senhontan manieron, identigi la kristanismon al la moderna civilizo. Tiu, kiu observas per kristanaj okuloj, ekkonas, ke la tuta atmosfero de la jarcento estas venenita, tiel ke estas tute au preskaŭ neeble, pensi kaj vivi kristane, tiel ke eĉ la hipotezo de kristana solvo de la krizo, je kiu ni suferas, estas malebla.**

Kia do estas tiu fundamenta difekto? Ĝi konsistas en tio, ke ni vivas en epoko, kiu el la mono faris al si idolon kaj el la komforto moralon, kaj en kiu tiuj, kiuj laŭ sia diro tenas la spiritan kulturon, fariĝis tro fieraj pri tio. De tio venas la baro inter la « kleruloj » kaj la popolo. Kaj krome la monduma kulturo, per kiu tiuj «mondumuloj» sin ornamis, eĉ volis adapti la religion al sia monduma civilizo. Sed nenia kultura formo povas esti prava kaj justa, se ne kiel funkcio de la religio kaj por esti helpilo de la Savo. Ĉu estas surprize, ke en tia kultura situacio estiĝis disigo inter la « granduloj » de la kulturo kaj la popola klaso ? Kaj kiel tiu laborista klaso estus povinta akcepti religion mondumigitan, kiu ne plu ŝajnis farita por ĝi? Kiel la « servaj » laboroj de la laborista klaso ne estus devintaj aperi kiel mizera penado, dum ke la kuranta kaj oficiala opinio malestimadis pli aŭ malpli konsĉie ĉion, kio ne estis « liberalaj karieroj »? Alivorte, kiel la laboro de la laboristo ne estus malplenigita de ĉiu spirita enhavo, de ĉiu idealo? Kiel ĝi estus povinta konservi en senekvilibra civilizo la valoron, kiun donis al ĝi la kristanismo? Fine, kiel la laboristo en sia labora vivo estus povinta ne senti sin diferencigita de la « alia klaso » kaj baldaŭ kontraŭa al ĝi?

Oni vidas, kiel la problemo de la labora vivo estas profunde kunligita kun la pli vasta kaj pli terura problemo de **plena transformado de kulturo, kiu fakte montriĝas kiel antitezo de la vivo de la amasoj!**

La kongreso de la franca katolika junularo en Nancy ne povas elĉerpi tiun gigantan problemon, kiu juĝas la tutan civilizon, en kiu vivi centjaroj da kaŝita idolanismo nin kutimigis; devos sufiĉi analizi kelkajn ĝiajn esencajn aspektojn, por montri, en kiu senco ĝi postulas vere kompletan ordigon de nia socio.

Se do estas vere, ke tie kuŝas la sekreto de la klasantagonismoj, ĉu tiam ne estas devo de la kristanoj, esti la unuaj por ekzameni tiun situacion? Ĉar ĉu ili ne devas havi pli ol la « aliaj » la zorgon pri la unueco kaj harmonio en socio de justeco kaj amo? Ĉu ili devas retiriĝi antaŭ iuj konstatoj, eĉ se ili riskas malplaĉi al facilanimaj kutimoj aŭ al danĝeraj antaŭjuĝoj? Se estas necese, forlasi iujn ideojn, kiuj de longa tempo venenas la atmosferon de la labora vivo de iu « klaso » aŭ de iu « medio », oni nur devos aŭskulti la neŝanĝeblajn postulojn de la **kristana doktrino, kiu neniam transformiĝos, por plaĉi tiujn, kiuj ne volas servi ĝin, sed servigi ĝin.**

Celo de nia kongreso estas, alporti kelkajn klarajn ideojn en la komplikitecon de la demandoj, en kiuj la ekonomiaj postuloj de la laborista klaso kaj de la kamparana mondo komplikiĝas al doktrina-morala demando, kiu problemiĝas la sencon de **ĉiuj** « klasoj ». De ĉiuj tiuj klasoj, kiuj devas lerni la spiriton de la kunlaboro, en kiu ni dezirus povi baldaŭ saluti anoncon de la kristana socio!

---

**ALIĜU AL MOKA! Akceptu la oficon de Delegito! Fariĝu pioniro de la internacia katolika junulara movado !**

**SPECIMENAJ NUMEROJ de J. B. estos sendataj senpage al la adresoj de seriozaj interesuloj, kiujn vi sendos al ni!**





Ekzekutiva Komitato de la ĥina nacia sekretariejo de MOKA.

1. Pastro Joh. Evpt. Kao, O. F. M., nacia sekretario; 2. Aloizio Li, konsilanto; 3 Jozefo Lou, verkanto de gazetartikoloj; 4. Jakobo Tung, enlanda korespondanto; 5. Odoriko Li, gastogvidanto; 6. kaj 7. Jozefo Chang kaj Paŭlo Li, eldonantoj. La samideanoj Atanazio Li, financisto, kaj Liui Yu Chen, protokolisto, ne ĉeestas. — Ni ĝojas prezenti nian ĥinan MOKA-sekretariejon al nia amaro tutmonda. Ilia agado estas vere admirinda kaj — imitinda!

---

## Praktika preslaboro de svisaj studentoj en la KATOLIKA Agado.

De Willy Flammer, stud., Del. de MOKA, Stans, Svisujo.

Ĉiam, ĉie kaj ĉiel aŭdiĝas hodiaŭ la parolo : Katolika agado. Sed bedaŭrinde - preskaŭ ĉiam, preskaŭ ĉie kaj preskaŭ ĉiel tiu-ĉi parolo restis nur vorto; ne sekvis la faro. El « Katolika agado » estiĝis « Katolika vortado ». Tion enkore pripensante kelkaj svisaj studentoj — idealistaj kaj optimistaj — decidis praktike labori sur unu kampo de la Katolika agado, en la katolika gazetaro. Plej grava por la venko de la ideo katolika estas la presaĵaro — la katolikaj gazeto kaj libro.

Grandega malhelpaĵo por la disvastigado de la bona broŝuro katolika estas ĝia prezo. Ĉion donacatan oni akceptas; aĉeti oni ne emas, se la aĉetotaĵo ne havas « praktikan » valoron. Precipe malriĉuloj — sed ankaŭ riĉuloj — volonte legas bonan libron, povante akiri ĝin senkoste. Pro tio ĉia popolkleriga broŝuro, kiu devus trapasi multoblan, mil-miloblan eldonon, ne sukcesas. Proporcie malmultaj ĝin aĉetas kaj legas. Ne dekono ĝin legas, precipe ne tiuj, por kiuj la libro estas skribita.

Kiamaniere ni sukcesas disdoni broŝurojn senkostajn — unika vojo, sukcese enirigi la broŝuron en ĉiun familion katolikan?

La antaŭe nomitaj studentoj, travivinte romantikan antaŭhistorion, kuniĝis celante la produktadon de senkostaj broŝuroj per propra manlaboro. (La nomo de l'kuniĝo estas : Silvania). Post longa monkolektado

i!i aĉetis presejon. Ĉiu studento promesis dum libertempo labori ses tagojn en la presado de la broŝuroj aŭ pagi egalvaloron-25 Fr.

Oni sukcesis pagi la paperkostojn per reklamanoncoj sur la kovriloj, per la kotizoj de membroj pasivaj kaj per maklerado de presaj- kaj libromendoj. Sub aŭtoritata gvidado tiu studenta institucio jam bone funkcias. Multaj studentoj travivas libertempe ĝojplenajn tagojn en kuna laborado kaj kuna amuzado postlabora. Jam kelkajn broŝurojn (kiujn zorge elektas komisiono) ili presis kaj dissendis tra tuta Svislando. La svisaj pastraro kaj klerularo simpatie kaj favore observas la unuajn sukcesojn de tiu ideala perstudenta efektivigo de la Katolika Agado. —

Ĉu ni ne trovus ilojn kaj vojojn, sammaniere utiligi niajn fortojn por la katolika junulara movado internacia? Ĉu ni ne rikoltus egajn, mirigajn sukcesojn, se ni povus disdoni senkostajn propagandilojn, nacilingvajn bultenojn ktp? Se ni povus perfektigi nian dumonatan organon, ne farante ĝin pli multekosta? Riĉuloj neniam kuraĝas idealan entreprenon. Idealistoj ĉiam devas finance batali. Ankaŭ la svisaj studentoj ne estas riĉaj — tamen ili sukcesis. Kie estas volo, tie estas vojo. Kiu intensa pensulo eltrovas eblecojn? Moka certe ĝojus! —

# La katolika paca movado en la landoj de la mondo

Ni komencas artikoloserion, kiu donos sisteman superrigardon pri la katolika paca movado en la diversaj landoj. Ni jam nun volas konstati, ke la kontakto inter la movadoj diverslandaj estas ankoraŭ malbona. MOKA estonte okupiĝos serioze pri ĝia plibonigo. RED.

## I. Pri la eksterlanda kaj paca agado de la anglaj katolikoj.

La karaktero de la angla popolo estas — en tio konsistas ĝia forteco kaj ĝia malforteco — tre malsimpatia al abstraktaj idealoj kaj ĝeneralaj programoj. Ĝi ĉiam prenas la proksimajn, la realajn aŭ baldaŭ realigeblajn aferojn. Do ankaŭ la katolika paca movado, kiu antaŭ ses jaroj enpenetris en la landon, devis adaptiĝi al tiuj antaŭkondiĉoj. Patro **Martindale** S. J., unu el la plej eminentaj anglaj gvidantoj katolikaj, rakontas en la februara numero de la belga gazeto «La Terre Wallonne», kiel li tiam sentis sin devigata, verŝi malvarman akvon en la entuziasman flamon de la pioniroj plej altajn celojn proklamantaj. Li faris al ili jenajn praktikajn proponojn :

« Unue vi devas zorgi, ke la anglaj katolikoj iomete interesiĝu pri la statoj en aliaj landoj. Vi povas trankvile bazigi vian agadon sur la fakto, ke la katoliko en nia lando konas nur tri aferojn ekster Anglujo : Lourdes, ĉar li tien pilgrimas; Romon, ĉar tie loĝas la papo; kaj Jerusalemon, ĉar tie antaŭ longaj tempoj okazis multaj aferoj kaj ŝajnas, ke tiu urbo eĉ hodiaŭ ankoraŭ ekzistas. Vi devas doni informojn pri la diversaj landoj, pri iliaj statoj, iliaj problemoj, ilia katolika vivo, kaj en tio ĉiam akcenti la bonon kaj neniam elparoli ofendan, ĵaluzan aŭ malŝatan vorton pri ili. Kaj ne lasu vin tenti vidi la bonon malpli en tiuj landoj, kiuj estas al vi malsimpatiaj aŭ kiuj estas tielnomataj « malamikaj » landoj. « Se vi amas nur tiujn, kiuj vin amas, kaj bonfaras nur al tiuj, kiuj la samon faras al vi, kiel do vi tiam estas aliaj ol la idolanoj? » Tio postulos multajn oferojn de vi. Sed ĝi estos vere kristana agado. Tiom longe ke ne ekzistas publika opinio kaj bona volo rilate al la aliaj nacioj, ĉia teoria babilado restos en la aero. »

Kaj fakte la movado sukcesis ĝuste per tiaj metodoj. Jen mi volas mallonge skizi ĝian historion.



En oktobro 1923 renkontiĝis en Reading (inter London kaj Oxford) kelkaj gvidantaj katolikoj, kiuj estis konvinkitaj, ke estas unu el la plej aktualaj devoj de la katolikoj, labori por la paco inter la nacioj laŭ la katolikaj principoj kaj la direktivoj de la lastaj papoj. Ankaŭ ĉeestis kelkaj katolikoj el aliaj landoj, inter ili Prelato D-ro Giesswein el Budapest, la mortinta honora prezidanto de MOKA. La konferenco de Reading akceptis direktivojn, kiuj difinis la celon de la movado : kapabligi la katolikojn, efike realigi la papajn direktivojn por la efektivigo de la Paco de Kristo en la Regno de Kristo. En kunlaboro kun la angla episkoparo kaj kun preskaŭ ĉiuj katolikaj organizaĵoj de Anglujo, Kimrujo kaj Skotujo tiam estas fondita la « **Katolika Konsilantaro por Internaciaj Rilatoj** » (« Catholic Council for International Relations »). La prezidantecon bonvolis akcepti **Lia Kardinala Moŝto Francis Bourne**, ĉefepiskopo de London-Westminster, persone, la 18 plej gravaj katolikaj asocioj (inter ili la Virina Ligo, la Junvira Asocio, la Studenta Asocio, la Katolika-Sociala Gildo, la Misia Asocio, la Kuracista Gildo, la Teatra Gildo, la Kavaliroj de Kolumbo) estas reprezentitaj en la estraro. Unue sekretario estis Kapitano Epstein, la nuna sekretario estas la juna, sed fervora **Earl of Iddesleigh** (74, Victoria Street, London S W 1).

Ekzistas individuaj kaj asociaj membroj. La unuaj pagas jarkotizon de 5 ŝilingoj, la lastaj de minimume 21 ŝ. Inter la asociaj membroj troviĝas lernejoj ĉiugradaj (inter ili ĉiuj instruistaj klerigejoj), parohoj kaj unuiĝoj. Ĉi tiuj asociaj membroj rajtas ricevi senpagan paroladon de paroladisto sendita de la centrejo, — certe tre efika kaj por ĉiuj interesitoj tre agrabla institucio, kies enkondukon mi rekomendus ankaŭ por aliaj landoj. — Oni multe okupiĝis pri la **pedagogiaj** problemoj. Por ĉiuj anglaj lernejoj la registaro ordonis instruadon pri signifo kaj labormaniero de la Ligo de Nacioj. La Katolika Konsilantaro por Internaciaj Rilatoj eldonis specialajn studseriojn por katolikaj lernejoj kaj geinstruistoj, provante krei per tio kontakton inter la ĝenerala instruado pri la Ligo de Nacioj kaj klerigo pri la Katolika Eklezio kiel eklezio universala, pri la historia signifo de la papoj por la internacia paco kaj pri la paca ideo religie bazita.

La Konsilantaro eldonas kvaronjaran informbultenon « A Catholic survey » (« katolika superrigado »). Ankaŭ pri eldono de katolika paca literaturo la movado okupiĝis. I. a. ĝi eldonis la libron « la katolikoj kaj la paca problemo » de P. Keating S. J. kaj la broŝuron de la irlanda jesuito Brown « la katolikoj kaj la Ligo de Nacioj », krome ĝi subtenis la eldonon de la tutmonde famkonata libro de la germana katolika pacifista gvidanto P. Franciscus Maria Stratmann « Tutmonda Eklezio kaj Tutmonda Paco».


Multaj kunvenoj kaj demonstracioj diskutis temojn kiel « Papo, Eklezio kaj tutmonda paco », « la reĝeco de Kristo kaj la paco », « milito aŭ paco? », « la Ligo de Nacioj », « la internacia kunagado ». Oni interrilatigis eksterlandajn katolikojn kun anglaj samkredanoj kaj zorgis pri la reprezentado de Anglujo en internaciaj katolikaj kongresoj, ekz. de IKA, de la Unuiĝo de Studoj de Fribourg ktp.

1925 la Konsilantaro organizis en Oxford kune kun la intertempe bedaŭrinde mortinta Internacia Oficejo de Katolikaj Organizaĵoj en Romo, kun la Internacia Katolika Ligo IKA kaj kun la « Union d'Etudes » grandan Internacian Katolikan Kongreson kun ĉeestantaro el 28 landoj de ĉiuj kvin kontinentoj. Tiam la skribinto de ĉi tiu artikolo havis la plezuron, en la fina kunveno de la kongreso esprimi al la Katolika Konsilantaro por Internaciaj Rilatoj dankon kaj admiron pri ĝia agado.

Ankoraŭ pri du praktikaj helplaboroj el la du lastaj jaroj mi volas mallonge raporti. Dum la plej terura tempo de la persekutado de la katolikoj en Meksikujo la Konsilantaro okazigis grandan nombron da informkaj protestdemonstracioj. Kaj 1928 oni faris sukcesan monkolekton, kies rezultaĵo estas transdonita al la Apostola Delegato por Albanujo, por helpi la viktimojn de la malsatokatastrofo en tiu lando. W. S.



**Preĝo en la dezerto.**



**Ĉe la bordoj de la Oued.**

## EL LA LANDO DE LA INTERNACIA EUKARISTIA KONGRESO.

La afrika urbo Kartago (Carthage), iam centro de prosperantaj kristanaj komunumoj kaj agadejo de la granda episkopo Sankta Augustinus, sed de 1400 jaroj rabo de la islamo, vidis en majo nunjara la grandiozan demonstracion de Internacia Eŭkaristia Kongreso brile sukcesinta. Tiu lando de la « moderna » sanktulo Augustinus, kiu ja devis trapasi similajn religiajn kaj moralajn konfuzojn kaj tentojn, kiel granda parto de niaj nuntempaj gejunuloj, nun estas dezerto mahometana; sed ni esperas, ke iam « la dezerto ekfloros » kaj la kristana Afriko de la martiroj kaj sanktuloj reviviĝos el siaj tomboj. Ni salutas la junan Eklezion de Afriko!




# VENU AL BUDAPEST!



**Sankta Emeriko.**

La hungara nacio festas en ĉi tiu jaro la 900-jaran jubileon de Sankta Emeriko, filo de Sankta Stefano, fondinto de la Sankta Krono de Hungarujo. Sankta Emeriko estas patrono de la hungara junularo, kiu ĝojos akcepti en aŭgusto nunjara la katolikan junularon tutmondan, por en amikeco kaj frateco festi kun ĝi la memoron de sia granda patrono. — La liston de la diversaj kongresoj okazontaj en Budapest vi trovos en ĉi tiu numero. Ankaŭ okazos Katolika Esperanto-Kongreso, kaj en la solena procesio sur la Danubo veturos inter la ŝipoj de ĉiuj nacioj, kiuj salutos la Sanktan Sakramenton portatan de la Eksterordinara Papa Delegato, ankaŭ la ŝipo de la Esperantistoj. — Venu multnombre al Budapest, lernu de Sankta Emeriko, kiu, kvankam li jam mortis en aĝo de 23 jaroj, estis granda sanktulo, la amon al Dio kaj al la virtoj de la ĉasteco kaj karito, kaj festu kun katolikaj junuloj ĉiulandaj grandan feston de la frateco!



# Taskoj kaj eblecoj de internacia kunlaborado de la katolika junularo.

De Wilhelm Solzbacher.

En la novembra numero de « Jugendführung » (junulgvido), pedagogia organo de la katolikaj junularaj asocioj de Germanujo, Wilhelm Solzbacher publikigis, komencante per raporto pri la MOKA-kongreso de Barcelona, longan artikolon kun principaj kaj praktikaj rimarkoj pri la internacia agado de la katolika junularo. Ni ĉi tie tradukas el ĝi la trian ĉapitron. Ĉar « Jugendführung » estas ĉefe legata de pastraj kaj pedagogiaj gvidantoj de la grandaj asocioj, la artikolo okupiĝas unuavice pri la eblecoj ekzistantaj por ili.

Kiaj do estas post la spertoj de la lasta tempo, ankaŭ de la kongreso de Barcelona, la **nuntempaj** taskoj kaj eblecoj por internacia kunlaboro de la katolika junularo ?

Unue estas konstatote, ke la estraroj kaj sekretariejoj de la katolikaj junulasocioj en la diversaj landoj havas nur tre malperfektan kaj ofte tute nenian konon pri la laborado en aliaj, eĉ najbaraj landoj, kaj oni ĝis nun apenaŭ klopodis utiligi la valorajn spertojn, kiujn la frataj asocioj faris en la kampo de la **pedagogio, organizado** kaj **agado,** por la propra laboro. Sendube estas sufiĉe da kaŭzoj, por komenci pli bonan **interŝanĝon de ideoj kaj spertoj.**

Mi nomas kelkajn diferencojn en la junulara pedagogio kaj junulara laboro, pri kiuj detala diskutado certe estus tre fruktodona.

En kelkaj landoj (ekz. Germanujo, Belgujo, Nederlando, Francujo) ekzistas diferencaj asocioj por la **vira kaj la virina junularo,** en aliaj (ekz. Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo) la asocioj por junuloj kaj junulinoj estas komunaj, same kiel la lokaj grupoj, kaj la gazetoj (la tuta laboro estas miksseksa), en aliaj (ekz. Polujo) la asocioj estas komunaj, sed grupoj kaj gazetoj estas disigitaj. Kiajn spertojn oni faris pri la diversaj metodoj ?

**Gimnastiko kaj sporto** en kelkaj landoj estas praktikataj en specialaj asocioj, kiuj parte ankaŭ mem zorgas pri la religia, kultura kaj ĝenerala agado (ekz. Ĉeĥoslovakujo, Francujo), parte tiun agadon lasas al aliaj asocioj (ekz. Nederlando), en aliaj landoj la sporto estas praktikata interne de la ĝeneralaj asocioj (ekz. Aŭstrujo, Hispanujo), en aliaj per organizaĵo speciale kreita en konekto kun la asocioj ĝeneralaj (ekz. Germanujo). En kelkaj landoj la gimnastikaj asocioj enhavas ambaŭ seksojn (ekz. Ĉeĥoslovakujo), en la plej multaj ili havas nur virajn membrojn, en aliaj (ekz. en Germanujo) tute aparte de la vira asocio ekzistas komitato por virina gimnastiko formita el la rondoj de la junulinaj asocioj.

En kelkaj landoj estis la tendenco, ke la ĝeneralaj junulaj asocioj formitaj sur la bazo de la paroĥo dividis sin en profesiajn subfederaciojn (ekz. Belgujo, nun ankaŭ montriĝas tiu tendenco en Francujo), en aliaj oni tre multe zorgas, ke oni **ne** dividu laŭ sociaj medioj, sed kunigu **ĉiujn** kiel paroĥa junularo (ekz. Germanujo, Aŭstrujo), kaj ekzistas tute sendependaj profesiaj asocioj.

En kelkaj landoj ĉiuj katolikaj junulaj asocioj estas severe kunigitaj en unu granda centra organizaĵo (ekz. Belgujo, Italujo), en aliaj ekzistas federativa laborkomunumo (ekz. Germanujo, Hispanujo), en aliaj (tio estas la plej multaj) tute nenia kunagado, sed rivaleco. En kelkaj landoj la organizaĵoj apenaŭ transpaŝis la kunigadon laŭ eparkioj kaj regionoj (tio valoras kun rezervoj por Nederlando, Ĉeĥoslovakujo kaj Nord-orienta Hispanujo).



La **skoltismo** en kelkaj landoj estas praktikata interne de la grandaj asocioj (ekz. Aŭstrujo, en Anglujo por la virina junularo), en aliaj ekzistas malforta aliĝo de la skoltoj al la ĝenerala asocio (ekz. en Belgujo), kaj parte la skoltaj asocioj estas tute apartaj (ekz. Hungarujo, Polujo, Francujo, Hispanujo, Usono), en Germanujo pro specialaj kaŭzoj la katolika skoltado estas apenaŭ evoluinta.

En kelkaj landoj ekzistas grupoj similaj al la germana « Jugendbewegung » (« junulmovado » en plej malvasta senco) kaj ĝia speciala karaktero (ekz. « Les Compagnons de Saint-François » en Francujo, aktivistaj junulaj kaj junulinaj ligoj en la flandraj partoj de Belgujo, nun ankaŭ nova movado en Nederlando), en la plej multaj io tia ne estas konstatebla.

En kelkaj landoj estas certaj religiaj ordenoj, kiuj okupiĝas pri la pastra prizorgado de la junularo. Ekz. en Hispanujo la jesuitoj gvidas la marianajn kongregaciojn, la franciskanoj la « Juventud Antoniana » (junulaj unuiĝoj de Sankta Antonio), la salesanoj la « unuiĝojn de estintaj alumnoj » kaj la « misian junularon » ; en multaj landoj grupoj de la studanta junularo havas preskaŭ ekskluzive jesuitojn kiel pastrajn gvidantojn. En aliaj landoj neniaj tiaj kutimoj ekzistas.

En kelkaj landoj ĉiu okupiĝo pri politiko en la katolika junularo estas rigardata kvazaŭ herezio kaj peko kontraŭ la senco de la Katolika Agado (ekz. en Belgujo aŭ Italujo), en aliaj oni tute senskrupule okupiĝas pri politikaj aferoj kaj elektas politikajn komitatojn (ekz. La Nacia Komitato de la Katolika Junularo ĉe la Centra Partio en Germanujo).

Sen iu sistemeco kaj sen elparolado de prijuĝoj mi citis ĉi tiujn punktojn. Ili montru, kiom valoraj pri ili povus esti prudenta kaj detala internacia diskutado.

**Kion ni bezonas por tio ?**

Unue la intereson de la gvidantoj de la katolika junularo kaj de ĝiaj asocioj kaj ligoj. **Vizitoj en la sekretariejoj** de la frataj asocioj (pli valoraj ol belaj salutparoladoj en jubileoj kaj demonstracioj!), **interŝanĝo** de artikoloj kaj kliŝoj, korespondado, **diskutaj konferencoj** en la maniero de tiu, kiun fine de junio MOKA okazigis por gvidantoj de belgaj kaj germanaj kaj kelkaj alilandaj junularaj asocioj en Louvain, studvojaĝoj, partopreno je laborkursoj (pli grava ol partopreno en la grandaj naciaj kongresoj!).

Sed tiu internacia laboro ne rajtas resti monopolo de la gvidantoj. Kiel eble plej multaj el la katolika juna popolo devas ricevi eblecon por komenci personajn rilatojn al junaj katolikoj trans la limoj. Kiel **metodojn** mi nomas : korespondado, libertempa interŝanĝo, internaciaj vojaĝoj, partopreno je kongresoj, legado de eksterlandaj gazetoj kaj junularaj revuoj ktp. **Mondjunularo Katolika** penas kaj klopodas krei okazojn kaj praktikajn instituciojn tiucelajn. La asocioj kaj ligoj devus helpi ĝin en tio kaj atentigi siajn membrojn pri tiuj institucioj.

Certe ekzistas multaj malhelpoj, kiuj devos esti superataj; antaŭjuĝoj, naciista malvasteco, la malsameco de la lingvoj. Ankaŭ tie grandaj taskoj estas donataj. La **lingvaj konoj** devas esti praktikataj, kaj precipe kiel praktika internacia helpa lingvo **Esperanto** devos esti pli kaj pli disvastigata en la katolika junularo. Okazon al praktika utiligo donas la internacia korespondado per ĝi ebligata kaj la gazeto « La Juna Batalanto », kiu volas kaj devas fariĝi tribuno por internacia diskutado en la katolika junularo.

Ĉiuj ĉi tiuj aferoj povas esti farataj **nun** kaj ne bezonas grandajn preparojn. Se ni tiel laboradas, ni povos fari vere fruktodonan laboron, se venos la tago, por denove konstrui potencan katolikan junularan internacion kaj por revekigi la nun dormantajn internaciajn organizojn.

Kaj ĉion ni faru sub la granda **katolika** ideo, kiu enhavas la idealojn de la paco kaj de la frateco, kiel junularo de la Tutmonda Eklezio, servante la realiĝon de la Regno de Dio inter la homoj !

# Gravaj Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1930.

Kiel ĉiujare, MOKA kunmetis liston de gravaj internaciaj konferencoj, kongresoj, kunvenoj, tendaroj ktp. Tiu listo aperis en diversaj lingvoj kaj sinsekvaj eldonoj. Pri detaloj, programoj ktp. oni skribu al la citataj adresoj, ĝeneralaj informoj estas ankaŭ donataj de la internacia oficejo de MOKA, sed oni ĉiam aldonu duoblan afrankon aŭ du internaciajn respondkuponojn. La listo estas daŭrigota kaj kompletigota. De kelkaj aranĝoj la definitiva dato ankoraŭ ne estas fiksita. Ni speciale atentigas, ke la citado **ne** ĉiukaze signifas senrezervan rekomendon de la kongreso aŭ de la invitanta organizajo.

| | | |
|---|---|---|
| 1-4 julio | Budapest (Hung.) | Internacia kongreso de katolikaj edukistoj kaj junulargvidantoj. Ferenciek-tere 7, Budapest IV. |
| 5-12 julio | Oostduin-kerke-sur-mer (Belg.) | Internacia Esperanto-Libertempo. BEA, 142 High Holborn, London W C 1. |
| 12-13 julio | Altenberg (Germ.) | Internacia kunveno de katolikaj junulargvidantoj, precipe el Belgujo kaj Germanujo. MOKA, W. Solzbacher, Köln, Dagobertstr. 28, Germ. |
| 19-26 julio | Nijmegen (Nederl.) | Internacia tendaro de Skolta Esperantista Ligo. Pastro C. Preller O. P., Broerskerk, Nijmegen. |
| 17-29 julio | Arnhem (Nederl.) | Internacia Pedagogia Esperanto-Kurso de Pastro Ce. Julia Isbrücker, Oostduinlaan, 32, Den Haag, Ned. |
| 26 julio -10 aŭgusto | Daugaard-strand ĉe Veilefjord (Danujo) | Internacia Junulara Kunveno. International Ungdoms Liga, Postbox 122, Köbenhavn K. Dan. |
| 28 julio -3 aŭgusto | Marseille (Franc.) | Sociala Semajno de la francaj katolikoj. Temo : la sociala problemo en la kolonioj. Secrétariat des Semaines Sociales, Rue du Plat, Lyon, Ĉeestos eksterlandaj gastoj. |
| Aŭgusto | Innsbruck (Aŭstrujo) | X-a Internacia Katolika Kongreso de IKA. Msgr. Dr. N. Pfeiffer, Tovarna U. 3, Košice, Ĉeĥoslovakujo. |
| 2-9 aŭgusto | Oxford (Anglujo) | 22-a Universala Kongreso de Esperanto. 142. High Holborn, London W C 1. |
| Aŭgusto | London | Internacia Proletaria Esperanto-Kongreso (SAT). SAT, 23, Rue Boyer, Paris XX., Francujo. |
| 3-10 aŭgusto | Freusburg (Germ.) | Internacia Junulara Kunveno. Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg, Germ. |
| Aŭgusto | Chevreuse (Franc.) | Internacia Junulara Tendaro. Trait d'Union, 73-bis, Rue Bobillot, Paris XIII. |
| 4-8 aŭgusto | Liége (Belg.) | IV-a Internacia Kongreso por Infaneduko en la Familio. 44 Rue Rubens, Bruxelles, Belg. |
| 16-21 aŭgust. | Budapest (Hung.) | Internacia Kongreso de Katolika Junularo. Ferenciek-tere 7. Budapest IV. (**Grave** : sama adreso por ĉiuj aliaj aranĝajoj en Budapest!) |
| 16-21 aŭg. | Budapest | Internacia Katolika Esperanto-Kongreso (IKUE). Postafiok 203, Budapest. |
| 17-19 aŭg. | Budapest | Int. Konferenco de « Unio Cleri pro Missionibus » (Pastra Unuiĝo por la Misioj). |
| 17-18 aŭg. | Budapest | Int. Katolika Konferenco kontraŭ la Alkoholismo. Hoheneck-Zentrale, Puttkamerstr. 17, Berlin. |
| 18 aŭgusto | Budapest | Int. Kat. Virina Konferenco. |
| 18 aŭgusto | Budapest | Jubilea festo de la katolika studenta asocio Foederatio Emericana kun paroladoj de reprezentantoj de ĉiulandaj universitatanaj ligoj. |



| | | |
|---|---|---|
| 19 aŭgusto | Budapest | Eŭkaristia Kongreso kun internacia ĉeestantaro. |
| 20-23 aŭg. | Budapest | Internacia kongreso de marianaj kongregacioj. |
| 21-23 aŭg. | Budapest | Int. konferenco de kat. parlamentanoj, verkistoj kaj fakuloj pri internacia juro. |
| 21-23 aŭg. | Budapest | Int. kongreso de katolikaj kuracistoj. Temo : Seksa etiko. |
| 21-26 aŭg. | Budapest | Internacia katolika sociala semajno. |
| 21-26 aŭg. | Budapest | Internacia katolika literatura semajno. Po unu vespero por la diversaj lingvogrupoj. |
| 20-30 aŭg. | Novy Targ (Polujo) | Orienteŭropa junulara kunveno. Kaspar Mayr. Wien VII., Döblergasse 2/26. |
| Aŭgusto | Ljubljana (Jugoslav.) | Internacia katolika misia kongreso. |
| 26 aŭgusto -3 septembro | Como (Italujo) | Internacia Esperanto-Festo. BEA, 142 High Holborn, London WC 1. |
| 24 aŭgusto -7 septembro | Bierville (Franc.) -Ostende-Bruxelles -Antwerpen -Liége. | X-a Internacia Demokrata Paca Kongreso (de Marc Sangnier). La Démocratie, 34 Bd. Raspail, Paris VI. |
| 30 aŭgusto -3 septembro | Salzburg (Aŭstrujo) | Kunveno de la Katolika Akademiana (universitatana kaj intelektula) Asocio kun eksterlandaj gastoj. Temo : Kristo en la profesia vivo de la moderna homo. Kath. Akademikerverband, Köln, Altenbergerstr. 14, Germ. |
| 31 aŭgusto -4 septembro | Bruxelles (Belg.) | Internacia Katolika Gazetara Kongreso. |
| Septembro | München-Köln (Germ.) | X-a Internacia Kongreso de Pax Romana (Kat. univ. stud.). P. R., Abbé Grémaud, Gambach, Fribourg, Svisujo. |
| 4-7 septemb. | Münster (Germ.) | Germana « Katholikentag » (Katolika Kongreso) kun eksterlandaj gastoj. |
| 8-10 sept. | Paderborn (Germ.) | Kongreso de Katolika Paca Ligo kun eksterlandaj gastoj. F. d. K., Kuratus Hintz, Berlin NW 6, Schumannstr. 9-II. |
| fine de septembro | Athenai (Grekujo) | Internacia paca konferenco por la balkanaj landoj. Bureau International de la Paix, 8 rue Ch. Bonnet, Genève, Svisujo. |

**Krome ni atentigas pri :**

la **Mondekspozicioj en Liége kaj Antwerpen** okaze de la Centjara Sendependeco de Belgujo. En Liége nia amiko René Jurdant kun siaj amikoj el la A. C. J. B. (Asocio Katolika de la Junularo Belga) konstruis belan pavilonon nomitan « le grand restaurant ». Grupoj, vizitantaj ĝin komune, ricevos 25-procentan rabaton ;

la **Pasio-ludoj en Oberammergau;** la Internacia Frataro por Repaciĝo sub gvido de niaj amikoj Kaspar Mayr kaj Donald Grant luis belan domon kun multe da litoj, aranĝante internacian somerrestadejon. La domo estas je la dispono de niaj geamikoj vizitontaj Oberammergau. Aliĝoj estu sendataj al Kaspar Mayr, Wien VII., Döblergasse 2/26.

**ESPERANTO-LITERATURON je eksterordinare malaltaj prezoj vi povas aĉeti per la eldonejo LA JUNA BATALANTO. I. a. ni vendas la plej famajn romanojn originale verkitajn en Esperanto je prezoj konsiderinde pli malaltaj ol la oficialaj. Nur malgranda kvanto ! Mendu tuj la prezaron de la eldonejo!**

**Ĥinujo.**

**La nacia sekretario** Pastro Joh. Bapt. Kao denove povas raporti pri bonaj progresoj. Estas decidite, estonte eldoni la ĥin- kaj Esperantlingvan propagandan gazeton « Matena Stelo » /Sio-Ming-Sing kvaronjare en Shanghaj. Por la dua numero oni jam kolektis pli ol 50 dolarojn. La administradon gvidos nia kunlaboranto Nicolas Tchang-Ke-Fang en la Katolika Universitato « Aŭroro » en Shanghaj. El tiu gazeto oni volas fari imponan kaj interesan katolikan gazeton, kiu povos interesigi kaj varbi gravajn rondojn al la ideoj de MOKA Esperanto ktp. — Nia nacia sekretario Kao venos kredeble en ĉi tiu jaro al Eŭropo, por studi en la Universitato de la Franciskana Ordeno en Romo. Tiam li havos okazon persone interkonatiĝi kun eŭropaj gesamideanoj. La ĥina MOKA-laboro tamen, kiel nia sekretario sciigas, ne suferos pro lia foresto, ĉar nun jam laboras en Ĥinujo sufiĉe kapablaj kaj fervoraj kunhelpantoj.

**En Tung-Yuen-Fang** nun la tuta seminarianaro lernas Esperanton.

**Leterkesto.**

**Ĉi-tiu numero** devus enhavi gravajn raportojn pri la multaj novajoj el la katolika junularo, ekz. pri dekduo da kongresoj okazintaj en la diversaj landoj. Bedaŭrinde mankas la loko. Ni tamen enpresas du tre signifajn paroladojn, kiuj estas faritaj en du el la plej signifaj el tiuj kongresoj : tiun de P. Erich Przywara S. J. faritan en la Kongreso de la Katolika Junularo de Germanujo kaj tiun de Marc Schérer faritan en la Kongreso de la Katolika Junularo de Francujo. La unua skizas la spiritan situacion de nia tempo, la dua la socian situacion. Ambaŭ raportoj ne estas facile legeblaj kaj kompreneblaj, kaj sendube denove alvenos plendoj, ke nia gazeto estas «tro serioza». Sed ni ja ne estas amuza jurnalo. Do, se vi ne komprenas tuj, legu du-, tri- aŭ kvarfoje! Vi certe ne pentos!

**La sekvontan numeron** ni intencas eldoni en formo, kiu faras ĝi speciale taŭga por disdono en internaciaj kongresoj, kiaj ja tre multaj okazos en aŭgusto kaj septembro.

**Al G. S. en S.** « Heroldo de Esperanto » bone informas pri ĝeneralaj progresoj de la Esperanto-movado. Oni ne povas nei, ke ĝi sincere klopodas esti « neŭtrala », kvankam en tio ĝi ne ĉiam sukcesas. Mi rekomendas al vi : Legadu ĝin, sed ne senkritike! — Aliĝo al UEA estas rekomendinda. — Kompreneble katoliko devus ĉiam unuavice subteni la katolikan movadon.

**Al H. G. en M., C. Th. en D. k. a.** La internacia sekretario ne scias, kiel la subskribo de MOKA venis sub la propagandilon de tiu entrepreno. Eble la persona subskribo de nia protektoro episkopo Majlath kredigis al la firmo, ke ĝi ankaŭ povas publikigi rekomendon de MOKA. Cetere mi estas plene konvinkita, ke nek Msgr. Majlath nek Msgr. Deitmer, episkopo de Berlin, kies subskribo ja ankaŭ troviĝas sur la folio, iam donis senrezervan rekomendon, eble ili nur rekomendis iun aŭ alian libron eldonitan de D. B. Mia persona opinio : Aliĝo estas rekomendinda kun rezervoj. Al katolikoj kun nesufiĉa filozofia kaj literatura klereco aliĝo estas danĝera. Kaj ankaŭ ĉi tie : Unuavice subtenu la katolikajn instituciojn!

**Al multaj sendintoj de manuskriptoj.** Bonvolu iom pacienci. Al ni mankas la loko!

W. S.


**Nepre ĉiuj Esperantistoj kaj E-entreprenoj**

aliĝu al 9.-a eldono de

BES-ADRESARO

Simpla aliĝo 0.50 Fsv

kun adresaro 1 Fsv, kun adresaro kaj portreto 1.50 Fsv

**BES - Adresaro, Potŝtejn, — Ĉeĥoslovakujo.**


Presejo: Imp. DISONAISE, S. Winandy, Dison. Tél. 1398.